# HEJS JUNECO

**HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO**

ATOCHA, 98-4.º - TEL. (91) 230 87 98
28012 MADRID

numero 124
julio—85



# HEJS-JUNECO

ELDONAS, H.E.J.S. , Atocha, 98-4º, 28012 MADRID

REDAKCIO, Sol 83-85, 41003 SEVILLA

DIREKTORO, Alberto Franco

REDAKTOROJ, Francisco Javier Moleón
Ricardo Felipe Albert Reyna

Kunlaboras ĉi-numere:
Miguel A. Sancho Pardo.
Ricardo García Tarín.
Delegito de la Junulara Sekcio de Barcelona Esperanto-Centro.

Ⓚ Eldona Centro Makarena-80. Siksto-publikaĵoj, 1985

## N-ro 124 Julio - 1985.

## Enhavo:

1.................................La sorto estas ĵetita
2.................................Ĉi paĝo.............
3.................................Unua artikolo........
4.................................9-a HEJS-renkontiĝo..
5.............................Ĝenerala kunveno de HEJS...
6........................Ĉu kongreso aŭ tendaro?........
7.................... Simpozio pri la i.j.j. kaj E-o......
8-9...............................Centraj paĝoj........
10-11..............Komputoroj ne bezonas la anglan........
12.........................Konstruante Esperantion-1.....
13-14......................Aliĝilo por aliĝi............
15.........................Konstruante Esperantion-2.....
16...................Kurso pri BASIC en la 3-a A.K. de E-o

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro mem. La redaktistaro pretas lingve korekti ĉiujn kunlaboraĵojn prozajn, sed ne la versajn por ne ŝanĝi la originalajn rimon kaj ritmon.




Multon donacis la malaga renkontiĝo al HEJS. Tion vi trovos ene, en la kompleta raporto aŭ kroniko, kiu legeblas tuj post ĉi artikolo. Sed estas malfacile rakonti al neĉeestinto tion, kion Malago donacis al la partoprenantoj de la renkontiĝo. Malago donacis kaj regalis nin per ĉio, kion ĝi povis oferi. Kiel rakonti al vi la specialecon de tiu urbo, la magion kaj sorĉon de la noktoj sanktasemajnaj, la tuŝon mildan de la vento, la ensemblon de la monto kaj la maro? Certe Malago donacis al ni rememorojn neforgeseblajn. Nur la sopiro reiri tien konsolos nian bedaŭron.

Se vi ne ĉeestis la renkontiĝon, eble tiuj vortoj sonos al vi sengrave. Ilia vera signifo estas malfacile taksebla, ĉar temas pri sperto, kiun oni devas vivi gustumante ĉiujn minutojn kaj sekundojn. Sed ne nur la urbo konstruis tiun plezurigan etoson. Ankaŭ la interpersonaj rilatoj kontribuis al la neforgeseblecp de tiuj momentoj.

Je la fino ĉiu devis preni la nedeziratan trajnon aŭ aŭtobuson. La sonĝo estis tuj finiĝonta. Baldaŭ ni troviĝis en alia urbo, vidalvide al la ĉiutaga laboro, al la ĉiutagaj vizaĝoj, kaj tio eble ĉagrenis nin. Sed kial la sonĝo devis finiĝi? Eble en trankvilaj momentoj nia menso denove ekpleniĝas de rememoroj, kaj subite revekiĝas tiuj travivaĵoj, kies finon ni neniam deziris. Ho, kia splen´!

H-J

# 9-a H.E.J.S.-RENKONTIĜO

## MALAGA, 5-7 Aprilo 1985

Dum Pasko ĉi-jare okazis la 9-a renkontiĝo de junaj esperantistoj el la hispana ŝtato. Pli ĝuste, de la 4a ĝis la 7a de aprilo inter 60 kaj 80 gejunuloj (se mi ne miskalkulis) havis la ŝancon kunveni, amuziĝi, amikiĝi en Malago ĉe maro. Se vi ne povis ĉeesti, ĉiaj priskriboj ne kapablos pentri kion vi maltrafis. Jenaj peniktuŝoj eble vekos vian envion aŭ, se vi troviĝas inter la bonŝanculoj, vian memoron pri tiuj agrablaj tagoj ĵus pasintaj. Aliloke vi certe trovos informojn pri la oficialaj kunvenoj kaj konkludoj. Sciu tamen , ke verŝajne ekestis ponto inter la krokodilaj partoprenantoj kaj la "tristuloj", kiel oni nomis la terurajn malkrokodilojn, kiuj tre malgaje mienis pro la nuna situacio, tute ne kontentiga, de nia asocio. Tia ponto montriĝis urĝe necesa post la ĝenerala kunveno, guton post guto forlasita de multaj alvenintoj, dum kiu solviĝis feliĉe ĉiuj plej tiklaj problemoj por la tuja pluekzisto de organizaĵo kunordigonta la junularan esp-movadon en Hispanio. Sed ne ĉio estis seriozaj kunvenoj kaj problemoj. Diversaj programeroj altiris la atenton de diversaj personoj. Iuj preferis diboĉi;iuj turismis laŭ la marbordo kaj montoj, kaj ne mankis tiuj, kiuj senĉese diskutadis. Ĉiu havis sian lokon, fizike ofte koincidan: kiel priskribi la trankvilan etoson de la sandviĉejo "Petroselo" aŭ la festan atmosferon en la picaejo "Tarantela". Kiel vidi gi la vesperiĝon ĉe la pinto de la moleo aŭ la urban, montaran kaj maran pejzaĝon el la surmonta kastelo? Mi preferis la spontanajn konversaciojn ĉe tablo en trinkejo, kiujn mi trovis speciale riĉigaj el homeca vidpunkto. Bedaŭrinde, ke la renkontiĝo finiĝis kaj ĉiu devis reiri al siaj okupoj. Sed tiu amara finpunkto certe efikos kiel tripunkto kaj instigos nin ĉiujn alkuri al venontaj renkontiĝoj por retrovi la provizore kaŝitajn amikojn. Ĝis la Kartagena kongreso!

Rikardo F.A.R.

# ĜENERALA KUNVENO

Ĝi komenciĝis post la salutoj de ĉeestintoj (el Zaragozo, Valencio, Seviljo, Malago, Madrido, Jerezo kaj Elŝo aŭ Elĉo aŭ Elkso -sed mi eble maltrafis iujn-) kaj de neĉeestintoj, inter ili nia fondinto s-ro Aragay, niaj kordovaj samideanoj kaj nia sekretario José María Rodríguez (saluton, Ĉema!).

Ni akceptis ZARAGOZON KIEL KUNVENURBON POR 1986. Se Kordovo kaj Malago kuŝis tro for de vi, do sekvajare vi certe povos ĝui junan esp-an etoson.

Pro onta aliĝo tuja de la Andaluzia Esperanto-Junularo ni konsentis, ke la minimuma jarkotizo de ĉiu aliĝinta asocio -ĉu aŭtonomkomunuma, ĉu alispeca- estu 500 pes; ankoraŭ restas decidi kroman kotizon laŭ la nombro de membroj.

La estraro parte renoviĝis. Karles ne plu estos vicprezidanto precipe pro sia aĝo, kaj la sekretariecon, ĝis nun en Kordovo transprenis samurbano de la prezidanto por pli facila kunordigo kun ĉi lasta. La laboro kaj sindonemo de Ĉema estas tamen treege dankenda. Sekve la nuna estraro (alinome, la "tristuloj") estas jena (esperable ne ĝena):

Prezidanto: Miguel Angel Sancho Pardo (Madrido).

Vicprezidanto kaj HEJS-komitatano en TEJO: Alberto Franco Ramírez (Seviljo).

Ĝenerala Sekretario kaj estrarano pri financoj: Ricardo Felipe Albert Reyna (Madrido).

Kompreneble vi rajtas protesti kaj proponi vin mem aŭ alian por iu ajn el tiuj postenoj. Kaj bonvenas ankaŭ ĉiuj kritikoj kaj sugestoj pri la agado de nia bando (pardonu! asocio) kaj de ĝiaj estroj.

Ni malaliĝos el Koncize pro ĝia misa funkciado kaj klopodos por komune aliĝi al Kontakto (vidu apartan anoncon). La estraro esperas, ke tiu paŝo signifos plibonigon de la servoj de HEJS al la membroj.

La instrukomisiono (memoru, Kordovo-84) plulaboras serĉante utilan instrumaterialon. Se vi ne konsentas kun io aŭ volas proponi ion, ne atendu kaj ek al la paŝo.

# ĈU KONGRESO AŬ TENDARO?

Trankvi, homo! Ne temas ĉi tie pri la tikla demando, kiu estas preferinda, ĉu junulara aŭ ĉiuaĝa renkontiĝo. Ambaŭ logas min, ĉiu pro aparta kaŭzo. Mi ne eniras do en tiun eraran rondon, kiu nur perdigas tempon kaj energion. Mi aludas nur la kunsidon en la Malaga renkontiĝo, kie ni vigle diskutis, kia estu renkontiĝo de junaj espistoj. Ni tuŝis plurajn punktojn. Ĉiuj konsentis kaj akceptis, ke dormejo kaj kunvenejo prefere situu samloke. Ŝajnis bonvena ankaŭ la okaziga de rapidaj kursetoj paroligaj por komencantoj kaj por progresantoj; tio certe altiros multajn el ni. Sed iu devas proponi sin, por ke la lokaj organizantoj povu enmeti la sciigon en la programon. Ankaŭ turismaj vizitoj estis sopirataj. Tio ne signifas, ke ili estu devigaj; ni memoru tamen, ke ĉiuj "verduloj" (precipe se novaj) emas al organizaj aferoj; verŝajne tre multajn interesas la nura uzado de Esp-o kaj la kontaktoj, kiujn nur ĝi ebligas. En tiu sama senco enkadriĝas la sugesto, ke oni ludu pli multe en niaj renkontiĝoj, kaj ke tiuj ludoj taŭgu samtempe por instrui kaj kapti novulojn en Esperantion per la subtila reto de ĝojo kaj plezuro. Por ekzemplo teatraĵoj, ĉu improvizitaj, ĉu pli formalaj, eble adekvatas. Konsilo prefere akceptenda prezentiĝis: la ĝenerala kunveno de HEJS okazu ne la unuan tagon nek frue en la mateno, ĉar tio povas nur fortimigi eĉ la plej kuraĝajn; ni juĝu per la ĉi-jara sperto.

Pri lasta punkto ne lumis plena interkonsento, nome, ĉu ni kunvenu tendare aŭ kongrese. Mi preferas private diri la tendaran modelon, ĉar ĝi ebligas la ĉeeston de pli diversaj homgrupoj. Sed la kongresa formo faciligas la eksteran propagandon dumkunvenan kaj la seriozan okazadon de diskutrondoj. Verŝajne la temo interesas nin, ĉar supozeble neniu pli bona ol ni scias, kiel ni volas kunveni. Nepre do sugestu. Nur la mumioj ne parolas.

Rikardo Felipe Albert Rejna

# internacia junulara jaro 1985

**SIMPOZIO PRI LA INTERNACIA JUNULARA JARO KAJ ESPERANTO**

## REZOLUCIOJ:

H.E.J.S.:

- Eldonos kaj disvastigos broŝuron montrantan la praktikajn servojn, kiujn la gejunuloj povas profiti per Esperanto. La valenciaj oficialaj instancoj subvencios la eldonon.
- Kontaktos aliajn junularajn organizojn hispanajn kaj informos ilin pri la avantaĝoj de Esperanto por ilia internacia agado kaj kontaktoj.
- Instigos aranĝi kursojn de la internacia lingvo direktitajn speciale al la junuloj okaze de la Internacia Junulara Jaro.
- Instigos okazigi en Hispanio internaciajn laborbrigadojn (campos de trabajo internacionales) per la internacia lingvo -por eviti lingvan diskriminacion-, kiel jam okazas de antaŭ multaj jaroj en aliaj landoj.

En Malago, la 7-an de Aprilo de 1985.
9-a Renkontiĝo de H.E.J.S.

**JUNAJ SENDEPENDAJ VERKISTOJ** ESTAS KOLEKTIVO DE JUNAJ ESPERANTISTOJ, KIU KREIĜIS EN LA 4-a HEJS-RENKONTIĜO OKAZINTA EN MALAGO. ĜI CELAS KUNORDIGI LA PORELDONAJN STREBOJN DE LA JUNULOJ, KIUJ VERKAS KAJ TROVIS KONVENA PUBLIKIGI ĈI TIEL. TIU KOLEKTIVO SERĈAS KUNLABORANTOJN POR PUBLIKIGI KULTURAJN KAJ SCIENCAJN LIBRETOJN. LA UNUAN SUBVENCIOS ANDALUZIA ESPERANTO UNUIĜO KAJ TITOLIĜOS «PANDEMONIO». EN ĜI HAVOS LOKON BELETRAĴOJ, ESEOJ, KTP. ONI PETAS NUR, KE LA MANUSKRIPTOJ ESTU LINGVAĴE KAJ STILE DECAJ. ĜIS NUN TIUN KOLEKTIVON FORMAS JENAJ PERSONOJ: MIGUEL ANGEL SANCHO PARDO, MIGUEL FERNÁNDEZ, RICARDO F. ALBERT REYNA, FRANCISCO JAVIER MOLFÓN, ALBERTO FRANCO, FRANCISCO PÉREZ CRUCES, MARÍA JOSÉ QUESADA KAJ JORGE CANACHO CORDÓN. LA ADRESO DE TIU KOLEKTIVO, DE KIU VI POVAS PETI INFORMOJN, AŬ AL KIU VI POVAS SENDI MANUSKRIPTOJN, JENAS:

A.S.S. Apdo. 6026 41080 - SEVILLA.

## kontakto

ĈU VI JAM RICEVAS LA GAZETON "KONTAKTO"? SE JES, BONVOLU TUJ SCIIGI TION AL LA ESTRARO EN MADRIDO, ĈAR HEJS, KIEL PLIBONIGO DE SIAJ SERVOJ, KLOPODOS POR SENDI AL VI TIUN ĜUINDAN JUNAN REVUON EKDE NUN. VI DEVOS PAGI NENIOM (KROM LA NORMALA JARA KOTIZO AL HEF-HEJS -KIUN SUPOZEBLE VI JAM PAGIS-). DO, KIEL MEMBRO DE HEF-HEJS, VI DEVAS RICEVI HEF-BULTENON, HEJS-JUNECO, KAJ NUN KONTAKTO (GAZETO DE TEJO HAVINDA, BELASPEKTA, LEGINDA). JAM SUFIĈAS, ĈU NE?

## LABORBRIGADOJ

*(Campos de trabajo internacionales)*

ĈU JUNULARA ESPERANTA ETOSO INTERNACIA INTERESAS VIN? JEN MANIERO TION FARI AMUZE. VI KROME LERNOS IAN PRAKTIKAN KAJ UTILAN LABORON. SUFIĈAS, KE VI ESTAS KVAR AŬ KVIN PERSONOJ LOĜANTAJ NE TRO FOR UNUJ DE L'ALIAJ. DEMANDU DE LA ESTRARO, KIEL ORGANIZI LABORBRIGADON. REMEMORU, KE LA MINISTERIO PRI KULTURO KAJ URBODOMOJ DE URBETOJ ĈE KAMPARO HELPAS TIAJN ARANĜOJN PER MONO. INFORMIĜU ANKAŬ TIE!

LAŬ LA STATUTO DE H.E.J.S., LOKAJ AŬ REGIONAJ JUNULARAJ ASOCIOJ POVAS ALIĜI AL H.E.J.S. KAJ TIAMANIERE HAVI PLURAJN KOMITATANOJN EN TIU ASOCIO LAŬ LA MEMBRONOMBRO. TIUJ ALIĜINTAJ ASOCIOJ RESTAS TUTE SENDEPENDAJ KAJ TIEL POVAS HELPI H.E.J.S. POR KUNORDIGI LA JUNULARAN MOVADON EN NIA LANDARO HISPANIO. ANDALUZIA ESPERANTO-JUNULARO JAM FARIS TION. H.E.J.S. DEVAS ESTI NUN ARO DE ASOCIOJ KIAL LABORI DISE, SE KUNE ONI LABORAS MULTE PLI BONE?

ESTRARANOJ DE LOKAJ AŬ REGIONAJ JUNULARAJ GRUPOJ, INFORMIĜU PRI TIO ĈE NIA CENTRA ADRESO, AŬ ĈE LA ADRESO DE ANDALUZIA ESPERANTA JUNULARO, P.K. 611 41080-KORDOVO.

KASTILIANOJ (LEONAJ KAJ MANĈAJ), MURCIANOJ, VALENCIANOJ, KATALUNOJ, ARAGONANOJ, NAVARANOJ, EŬSKADIANOJ, ASTURIANOJ, GALEGOJ, KANARIANOJ, BALEARANOJ, EKSTREMADURANOJ, RIOĤANOJ, KANTABRIANOJ, MADRIDKOMUNUMANOJ, LA JUNULARA ESPERANTISMO EN HISPANIO NE EKZISTOS SEN VIA ASOCIA HELPO!!!

**H.E.J.S. BEZONAS VIN!**

## ESPERANTA AGADO EN ĈESTO (CHESTE)

*«Unua intensiva kurso de Esperanto»*:

ORGANIZE DE LA VALENCIA GRUPO KAJ HELPE DE LA LOKA GRUPO KAJ LA ĈESTA URBODOMO. OKAZIS ĈE LA GIMNAZIO JOSÉ MARÍA HARO, KIE ESTAS LA NUNA SIDEJO DE LA GRUPO DE ĈESTO "LUMRADIO". EKĈEESTIS PLI OL 30 PERSONOJ, EL KIUJ 10 PLENUMIS ĜIN. FINE OKAZIS VESPERMANĜADO EN LA KURSA LOKO. TIUN KURSON ONI ARANĜIS PER LA NOVEGA METODO FAR NIA USONA SAMIDEANO DENNIS KEEFE POR LERNIGI TIOM DA ESPERANTO KIOM EBLOS DUM UNU SESIO, KAJ ĜI OKAZIS POR LA UNUA FOJO EN TIU AJN URBO

Ricardo García.

# KOMPUTOROJ NE BEZONAS LA ANGLAN

Se vi iam alproksimiĝis al mikrokomputoro, eble vi rimarkis la kuriozan fakton, ke oni devigas la uzadon de iu difinita programadlingvo, kiu plejofte estas Basic. Simpla trarigardo de la klavaro sufiĉas por kompreno, ke la maŝino fabrikiĝis nur por anglalingvanoj.

Multaj personoj akceptas nekapturne ĉi situacion. Kial rifuzi la plej internacian lingvon? Sen la angla, komputoroj prezentus nenian "teknologian ŝajnon".

Kontraŭe al tiu opinio mi restas konsternita. Ĉar stulta, mi direktas ĉi tiun artikoleton nur al aliaj stultuloj, kiuj preferas programi per propralingva aŭ esperanta Basic.

Fabrikistoj asertas, ke sole la angla adaptiĝas al klara programado. Ili eĉ misimformas, ke ekzistas hardvara problemo. Mi devas diri, ke tio estas mensogo simpla, kaj mi montros la kialon.

Por ke vi mem juĝu, kiom klaraj estas neanglaj Basic-oj, jen mi proponas kelkajn komunuzajn komandojn kun ilia ebla konerna traduko en Esperanto:

| Normala Basic: | Esperanta Basik: |
|---|---|
| GO TO | IRU AL |
| FOR | POR |
| TO | AL |
| NEXT | SEKV |
| IF... THEN | SE... DO |
| ktp... | |

Nun respondu, kiu estas plej kara?

Homoj estas kapablaj konstrui komputorojn, kies interno softvara estus tute esperanta. Eĉ la nuntempaj povas funkcii per esperanta Basik. La sola motivo, kiu igas la rifuzon de la fabrikistoj estas la manko de monprofito je tiu enkonduko. Verdire usonaj kaj britaj entreprenistoj vidas neniun solvendan problemon: krom la angla ne necesas alia lingvo!

Ĉio ĉi ne signifas, ke ni devas rezigni nian reziston.

Kvankam iom pene ni povas modifi la softvaran sistemon de la aparato, kaj anstataŭigi ĉiun vorton de la angla Basic per alia en la lingvo, kiun ni plej ŝatas. Tia povo ne ampleksas nur Basic, ĉar ni povas fari la samon en aliaj programadlingvoj. Jen ekzemplo: Logo.

Logo estas bazita sur la pririnfana psikologio de Piaget. Tiu fama svisa pedagogo disvolvis teorion pri la evoluo en la lernokapablo de la infano. Grupo de usonaj reserĉantoj klopodis uzi praktike liajn ideojn, kaj kreis Logon.

Pedagogoj deziras utiligi Logon por rapidigi la kreskon de la infana inteligento. Por tio ili tamen bezonas, ke la programoj estu propralingve verkitaj. La kreintoj mem de la lingvaĵo enkondukis en la kompililon la manieron modifi la jam enigitan vortaron. Per propraj komandoj Logo povas senprobleme ŝanĝiĝi alilingven.

La samo okazas ofte je la ceteraj lingvaĵoj por programado, sed la problemo pri la esperanta Basik restas. Multaj personoj prezentis sian reziston per la kreo de propra esperanta Basik-versio. Nun mi prilaboras la eblon atingi esperantan instrucikodon por la komputoro ZX Spectrum. Se vi disponas je Apple IIe, la numero 28a de "El Ordenador Personal" solvas la problemon. Ankoraŭ necesas versioj por Commodore, New Brain, Dragon, IBM, ktp...

Angle programi? Ne, dankon!

MIGUEL ANGEL SANCHO PARDO

**Faka glosaro:**

**Softvaro:** logika sistemo, kiu igas la funkciadon de komputoro.

**Hardvaro:** materiala bazo de la logika sistemo, komputora maŝinaro

**Kompililo:** programo permesanta la enstorigon de nova programadlinguo.

**Storo:** ejo, kie restas programoj kaj datumoj.

**Basik** = esperanta Basic.

# Konstruante Esperantujon

Ni geesperantistoj scias, ke ni apartenas al granda forta kaj grava movado. Alie multa neesperantista popolo dank' al la usona imperiismo pensas, ke tio estas utopio, ke esperanto estas nur lingvo, nun taŭganta por nenio. Tiel do ni devas bone propagandi nian movadon por konstatigi al la popolo, ke tio, kion ili pensas estas malpravo, kaj por forigi la kulturan imperiismon, kiun oferas la naciaj lingvoj.

Laŭ mia opinio la ĝisnuna propagandsistemo pri esperanto ne sufiĉas. Ne sufiĉas diri inter amikoj: ĉi tio estas esperanto, lernu ĝin. Ne sufiĉas de tempo al tempo sciigi per la radio kio estas esperanto. Tiel la vojo por atingi nian celon estos tre longa. Mi opinias, ke ni devas krei kaj oferi la legitimecon de Esperantujo, ĉar ni vere estas kiel komunumo.

Sed, kion fari? Kiel krei kaj oferi tiun legitimecon al la publiko? La respondo estas: laborante en ĉiuj kampoj de la ĉiutaga vivo. Ne resti fermitaj en nia rondo. Kaj jen pluraj ekzemploj:

-En sporto: krei klubojn futbalajn, basketbalajn,ktp. kun esperanta nomo kaj partopreni en la internaciaj konkuroj. Eĉ eble ni havos grandajn ĉampionojn.

-En muziko: fari muzikon ne nur por la esperantistaro, sed ankaŭ por la neesperantista publiko. Partopreni en la internaciaj festivaloj kun la nomo Esperantujo.

-En televizio: fari internaciajn programojn en esperanto. Jen estas ekzemplo pri internacia programo en nia fama jam malaperinta 300 milionoj.

-Neniu esperantisto krokodilu kiam ĝi parolu kun alia samideano.

-Ne nur diri, mi estas hispano, sed hispanesperantisto.

_En ĉiu lando oni sekvu la ekzemplon de Bulgario, kreante internaciajn ejojn, kiuj estas kiel memstaraj urboj:

(Daŭrigo en paĝo 15)

41.IJK



# 41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
## SCHLOSS ERINGERFELD
## 22.-29.7.1985 F.R. GERMANIO

---

*LKK:* Germana Esperanto-Junularo, Postfach 101422, D-2000 Hamburg 1
Tel.: F.R.Germanio 040-250 30 65

***Pagoj:*** Poŝtĉekkonto 1316 90-754 en Karlsruhe, kun indiko "41-a IJK"
je nomo Germana Esperanto-Junularo, Hamburg

# aliĝilo

***Mi aliĝas al la 41-a IJK (22 - 29 julio 85) en Eringerfeld laŭ ĉi-dorsflankaj kondiĉoj.***

Familia nomo: ---------------------------------------- nask.: ------------

Persona nomo: ---------------------------------------- sekso: ------------

Kompleta adreso (latinaj literoj, kun landnomo kaj poŝtkodo):

----------------------------------------------------------------------

----------------------------------------------------------------------

Lando: ---------------------------- Telefono: ---------------------------

Vegetarano: jes / ne Fumanto: jes / ne

Dato de pago: ---------------- Pagmaniero: ---------------------------

Dato de aliĝo: ---------------- Subskribo: ---------------------------

Ne plenigu!

| TEJO-membro | pago ric. | konfirmilo | restkotizo | |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

| *kotizoj* | *aliĝo ĝis* | | | |
|---|---|---|---|---|
| *DM* | *15.01.85* | *01.05.85* | *01.07.85* | *surloke* |
| *ĝis 21* | **150** | **170** | **190** | **210** |
| *ĝis 25* | **170** | **190** | **210** | **230** |
| *ĝis 35* | **250** | **270** | **290** | **310** |
| *pli* | **310** | **330** | **350** | **370** |



O Mi pagas laŭ ĉi-supra tabelo: + ____________ DM

O Mi estas individua membro de TEJO
kaj rajtas je rabato de 20 DM: - ____________ DM

O Mi mendas la adreslibron de Pasporta
Servo kaj aldonas po 5 DM por ____ ekz.: + ____________ DM

O Mi volas subteni la kongreson per donaco: + ____________ DM

sumo = ____________ DM

O Se eblas, mi ŝatus loĝi kune kun:

______________________________________________________

O Mi volas kontribui al la temo aŭ programo per:

______________________________________________________

______________________________________________________

***Kondiĉoj:*** La plena kongreskotizo rajtigas loĝadon, manĝojn kaj partoprenon en ĉiuj kongresprogramaj aranĝoj - Kiel aliĝdato validas la dato de ricevo de la kompleta pago - Por aliĝantoj el landoj, de kie ne eblas transpagi al F.R.Germanio, kiel aliĝdato validas la dato de ricevo de la aliĝilo - Se vi malaliĝas ĝis plej malfrue unu monaton antaŭ la IJK, vi rericevas vian antaŭpagon minus 20 DM - Via aliĝo estas transdonebla al alia persono, sed ni alĝustigos la kotizon laŭ la aĝo de la anstataŭanto - Por partatempa ĉeesto ni kalkulas la plej altan kotizon en la respektiva aĝkategorio dividite per 7, multiplikite per la nombro de partoprentagoj - Por personoj, kiuj partoprenas nur la programon, ni vendas tagajn biletojn por po 5 DM - Ne eblas tendumi en Eringerfeld, nek en la ĉirkaŭa tereno!

kun kinejo, dancejo, restoracio, trinkejo, naĝejo... Tio estas, kiel etaj "esperantujoj".

Eble vi pensos, ke tio, kion mi diras ja estas fantaziaĵo. Sed antaŭlonge oni pensis pri ebla fantaziaĵo, kiam oni diris, ke la tero estis ronda, ke la homo iam paŝos sur la luno. Nia afero estas multe pli simpla kaj facila.

Laŭ la antaŭaj ideoj ni povos:

-Unue, allogi la publikon al nia movado avantaĝante la anglan lingvon, ĉar hodiaŭ la homoj, junaj precipe, sekvas kio estas modo.

-Due, tio servos por ke la esperantistoj trovu ion pli praktikan en la movado ol legi revuojn kaj korespondi. Restos pli da personoj en la movado post ellerni la lingvon. Mi diras tion, ĉar mi devas diri la veron. Multaj esperantistoj nuntempe lernas la lingvon, poste legas revuojn kaj korespondas kaj kunvenas de tempo al tempo. Se ili ne havas monon por vojaĝi, preskaŭ por nenio pli taŭgas al ili esperanto. Ili enuas kaj foriras el la movado. Krome se ni konstruas tiun imagan esperantujon, ili sentos sin pli interne en la movado, anoj de vere granda entrepreno, aŭdante ĉiutaĝe pri la vivo de Esperantujo, kiel pri alia ajn lando.

Ni devas konstrui Esperantujon por havi solidan bazon por trovi taŭgajn vojojn kaj atingi nian finan celon.

Mi je la fino resumus ĉion dirante: "Estas necese vivi esperante". Kaj tiu estas mia propono, la propono de juna esperantisto, kiu deziras, ke esperanto triumfu "jam" kaj ĉie.

Delegito de la Junulara Sekcio de Barcelona Esperanto-Centro.

---

# 3a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

**De la 15-a ĝis la 18-a de Aŭgusto, 1985**

**LKK str. Pozo, 3 41003-SEVILLA (Hispanio).**

## TRITAGA KURSO PRI ELEMENTA KOMPUTIKO: BASIC

La celo estas enkonduki la lernantojn teorie kaj praktike en la principojn de komputiko, kaj korekte uzi la bazajn BASIC-ko mandojn de la mikrokomputotoro ZX Spectrum.
3 sesioj (7 horoj kaj duono)

### PROGRAMO

Unua sesio: Historia skizo.
Problemoj kaj algroitmoj.
Hardavaro kaj softvaro.
Lingvoj por programado.
Basic: Baza Instruci-kodo por Generala Uzado.
Eldono de programoj.
Funkciigado, interrompo kaj daŭrigo de programoj.
Enstorigo kaj elstorigo.

Dua sesio: Programaj rimarkoj kaj stetikaj elementoj.
INPUT kaj PRINT.
Bukloj.
Matematikaj esprinkoj kaj funkcioj.
Simbolkatenoj.
Nematematikaj funkcioj. Logikaj operaciiloj.
DATA

Tria sesio: Matricoj.
Subprogramoj.
RND.
Desegnoj kaj sono.
Elmentro de aliaj programad-lingvoj.

## DEBATO

Horo kaj duono.
"La fi-negoco de la mikrokomputorvendado".
Tri aŭ kvar personoj prezentas tezeton kaj estigas interdialogon. La publiko rajtas interveni.

## PREZENTO

Memlernado de Esperanto per Komputiko. Prezento de sonbendo kun programoj por Spectrum. Prezento de programo por Commodore.